

PREZO: 1.- Kr.

Sturetr. A.B. Sthlm 1950

MALGRANDA REVUO

Nro 4 • 1950

8a JARO

ENHAVO:

	Pago
Pri la Eŭropa Olimpo, de Juan Régulo Pérez	1
Respondo al "Israela Letero", de Rudolf Anders ...	6
Samideana letero, de Carlos de Jesus.....	11
Ĉu pliriĉigo de nia lingvo estas malutila? de W. v. Waldowski.....	13
Debato	16
Voĉo el Japanujo	21
Lingvaj sugestoj	22
Literaturo.....	24
Grava memorando	29

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemonditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin afranko por resendado.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brusel W.
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en CSR, Uralské Nám. 9, Praha.
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.
Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 4

8a JARO

1950

Pri la Eŭropa Olimpo

De JUAN RÉGULO PÉREZ

Lastatempe aperis sur la paĝoj de la esperantista gazetaro la nomoj *Faŭsto* kaj *Don Kiĥoto*. De longe troviĝas en la sama gazetaro, kvazaŭ indiĝeno, *Hamleto*. Foje oni legas ion pri *Don Ĥuano*. Ĉiuj estas nomoj de fiktituloj, sed fikciaj nur kiel estas la dioj kaj herooj de la prareligioj. Tamen, ĉu ili estas vere fikciaj? Aŭ, kontraŭe, ĉu ili ne estas eĉ pli veraj, ol tics propraj kreintoj? Efektive, temas pri nova mitologio, pri la eŭropa mitologio.

Eŭropo estas la kontinento plej bone dotita de la naturo por kreskigi individuojn. Tiel eŭropaj poetoj kreadis ian Olimpon, kiun loĝas ne dioj, sed homoj. Niaj olimpanoj ne estas Jupitero, Vulkano, Marso, Merkuro, Neptuno, Apolono; ili estas homoj: dana princo, manĉa hidalgo,¹ germana doktoro, andaluza dihoĉulo, rusa studento, norvega vojaĝisto. Ili estas tiel vivemaj, ke tuj post ilia estiĝo ili ekvivis kun ni, kiel ĉiamaj, jam nedisigeblaj kunuloj de nia vivo. Certe por ni Don Kiĥoto kaj Don Ĥuano ne estas tiel vivaj, kiel nia najbaro, sed Don Kiĥoto kaj Don Ĥuano estas por ni estuloj pli vivaj kaj materiaj, pli karnostaj ol la famuloj, de kiuj nin disigas la tempo, kiel Cezaro aŭ Napoleono, aŭ la spaco, kiel Hiro Hito aŭ Stalin.

La kvar eŭropaj spiritidoj plej elstaraj estas Don Kiĥoto, Hamleto, Faŭsto kaj Don Ĥuano. Ekzistas aliaj, nome Ivan Karamazov, Peer Gynt, ktp. Sed la unua kvaroj konsistas el la plej gigantaj. Rimarkinde estas, ke el la kvaroj du estas hispanoj; sed kiel sciante Hispanujo estas ia miniatura Eŭropo, t. e. kuniĝo de elstaraj malsimilaĵoj, kio emas naski tre fortajn figurojn. Eble al iu ŝajnas mirige, ke en la supra listo ne estas iu franca

aŭ itala nomo, kiam oni konsideras, ke tiuj landoj estas la plej gravaj naskejoj de la eŭropa kulturo. Sed tio ne estas miriga: Francujo kaj Italujo ne donas la protagonistojn; ili kreas la scenejon, la fonon, la normojn. Sen la eŭropkultura fundamento, kiu estas plejparte itala kaj franca verko, la estiĝo de la granduloj de nia eŭropa Olimpo estus ne nur ne ebla, sed eĉ ne imagebla.

Kaj kial estas tiel realaj tiuj spiritidaj eŭropanoj? Tion kaŭzas du kontraŭaj trajtoj: ili estas samtempe konkretaj kaj nedefinitaj. Konkretaj ili estas en la medolo, en la kerno de sia karaktero; nedefinitaj kaj ŝajne eĉ kontraŭcaj ili estas en sia detala agado, en sia propra elvolviĝo.

Tiuj spiritidaj eŭropanoj nin mirigas kaj igas nin demandi, kion ili volas kaj kial ili faras siajn agojn. Tamen, ili estas tiom individuecaj, ke malgraŭ la ŝajna malkongruenco de iliaj agoj neniu dubas pri ilia ekzisto, kiel okazis al angla kampulo, kiu post longa rigardado al iu kamelo kuntiris siajn ŝultrojn kaj foriris, dirante: "Tia aĵo ne ekzistas". Hamleto, Don Kiĥoto, Faŭsto, Don Ĥuano faras strangaĵojn, konfuza la homojn, sed neniu dubas pri ilia ekzisto. Precize, kiel okazas al ni, kiam nia najbaro faras nekompreneblajn agojn.

Tial ilia vitalo.² Ĉar kvankam la kvar posedas mirigan povon por simboligo, ili estas ne nuraĵ simboloj; ili estas personoj, kiuj trairas la mondon kun tiu enigma etoso,³ kiun ĉiu homa estaĵo, se fakte ĝi vivas, kutime posedas. Ili estas irantaj enigmoj, kies unueco estas pli korpa ol spirita kaj apartenanta pli al la mondo de la ŝajnoj kaj plastikaj formoj ol al tiu vasta transfundo, kiun konsistigas impulsoj, pensoj kaj intuicioj; ol al tiu mondo, kiu sin etendas trans la atingo de la plej akraj okuloj ĝis nebulaĵ kaj neimageblaj horizontoj. Kontraŭaj, sed koheraj, nuancoriĉaj, ligitaj al la ĉirkaŭmondo per ia nedefinita hel-malhelo delikate modulita; tamen, tiel netaj je profilo, gesto kaj stilo, ke ili restas al ni tute konataj. Sed se ni intencas analizi nian konon pri ili, ni konstatas, ke "ilin koni" signifas por ni nur tion, ke ni scias, kiel ĉiu el ili rifuzas nian penetremon kaj konservas sian enigmon. Ni konscias, ke ni ne sukcesis eniĝi en la enigmon de Don Kiĥoto nek en tiun de Hamleto; sed malgraŭe ni konscias, ke iliaj enigmoj estas mal-

samaj kaj ke ni perceptas iliajn profilojn, formojn, moralan konsiston, kies oĝoj kaj akraĵoj raras kaj foje eĉ vundas nian propran internan enigmon. Tial la gloro de iliaj kreintoj estas ia kvazaŭa povo ekmarŝigi difinitajn kaj konkretajn misterojn, kiujn ĉiu rekonas eĉ ekvido kaj distingas de tiuj de la ceteruloj, kvankam ne penetrante ĝisfunde ilian propran sekretaĵon.

Ĉi tiuj faktoroj: interna vitalo, konkreta profilo, funda enigmo klarigas la fakton, ke la spiritidaj eŭropanoj altiras sur sin mem la spertadon kaj vivon de sinsekvaj generacioj, kaj tiel ili kreskas je signifo kaj morala riĉo kun la rikolto de ĉiu jarcento. *On ne prête qu'aux riches.* Ĉi tiuj kvar figuroj, kiujn Shakespeare, Cervantes, Tirso kaj Goethe ĉizis en la revojn de siaj respektivaj samtempuloj, kun la paso de ĉiu jarcento iĝas pli grandaj, ĉar ili sin nutras per la revoj de la tagoj, kiuj fluas. Tiel ili, klasikuloj, estas samtempe modernuloj; kaj vestitaj laŭ sia tempo ili estas tamen ĉiam nunaj; kaj naskitaj anglo, hispanoj kaj germano, ili ĉiam estas eŭropanoj, tutmondanoj, kun tiu nuanco de universaleco, kiun la eŭropa spirito ŝuldas al sia sokrateca cerbo kaj al sia kristana koro.

La kvar superuloj malsamas, kompreneble, en la maniero, kiel ili kreskas en la tempo. Ĉi-koncerne, kiel en ĉio cetera, ilin movas ilia propra aŭtonomio vitala. Ĉar ili ja ne estas obeigeblaj al subiĝo kaj manovro, kiel rekrutoj dum eklerno sub komando de serĝento, kaj al viciĝo je kapricaj paralelaĵoj, kiujn oni atingas nur per simpligoj kaj stumpigoj. Eĉ Faŭsto mem, la germano en la aro kaj sekve la plej disciplinema, ne tolerus, ke oni perfortus por artefara skizo la limojn de lia objektiva realo. Se eblas skizo, konturo, se oni faras paralelojn, tio estiĝos nur kiel komparo inter iuj aspektoj de la kvar grandaj eŭropanoj, sed ekskluzivante, kompreneble, la subtilan kompleksecon de la cetero de la kvar superuloj, kiu rifuzas ĉian klasifikon pro sia originaleco kaj unikeco.

Por atenta observanto konturiĝo komenciĝas, kiam oni priatentas la historian elvolviĝon de la kvar estaĵoj. Hamleto kaj Don Kiĥoto ŝajne apartiĝas de la du aliaj kaj alproksimiĝas inter si. Ambaŭ estas kiel arboj kun tre forta radikaro, kies kerneca konsisto determinas ilian fortikan elvolviĝon, tiel ke la interpretoj kaj aldonoj, kiujn alportas sinsekvaj jarcentoj,

en nenio aŭ malmulto koncernas ilian originan pratipon. Ambaŭ naskiĝis jam tiom multformaj, tiom riĉe orkestritaj, ke, kia ajn estu la humoro en kiu oni proksimiĝas al ili, ili ĉiam eldonas reeĥojn de profunda homo senco. Hamleto, kvankam dana princo, ja estas anglo, eĉ *la anglo* plej altgrade; kaj Don Kihoto estas hispano, kaj eĉ *la hispano* plej altgrade; kaj ambaŭ estas origintipoj tiel elstaraj de siaj respektivaj landoj, ke tuj ili atingas la eŭropecon. El la multaj manieroj, laŭ kiuj io estas angla, tiel, ke tuj ekkrias rigardanto: "Nu, kiom angla estas tio ĉi!", preskaŭ ĉiuj troviĝas en Hamleto. Kaj same okazas pri Don Kihoto kaj la hispana. Tial, ĉu laŭ simileco, ĉu laŭ kontraŭeco, kiu ajn eŭropano, kiu sin proksimiĝas al ili, elvokas el ili la anglan aŭ la hispanan reeĥon kaj tuj sin sentas en sia Eŭropo.

Sed la reeĥoj pli riĉaj estas tiuj, kiuj elstariĝas, kiam oni alproksimiĝas ĉi tiun anglon kaj ĉi tiun hispanon inter si. Kio estas hispana en Don Kihoto, estas ĝuste tio, kio kontrastas kun la angla kaj sekve kun Hamleto. Kio estas hispana en Don Luano estas ĝuste kaj antaŭ ĉio kio kontrastas kun la germana kaj sekve kun Faŭsto. Tial Hamleto kaj Don Kihoto konsistigas unu el la plej interesaj paraleloj de la tutmonda literaturo, eble dank' al tio, ke iliaj du kreintoj estis samtempuloj kaj, kvankam ili ne konis unu la alian, parolis la saman mentalan⁴ lingvon. Sekve la paraleligo inter Hamleto kaj Don Kihoto estas unu el la irejoj pli larĝaj por kompreni ambaŭ ĉefheroojn kaj por studi Eŭropon kaj ĝiajn nevelkemajn problemojn.

Hamleto kaj Don Kihoto simboligas la du kontraŭajn deklivajn de la eŭropa socia ĉefproblemo: tiu pri la ekvilibro inter la individuo kaj la kolektivo, en kiu li vivas. Hamleto vivas en la mezo de densa kaj konscia socio, kiu postulas multon de li; Don Kihoto vivas ĉe la randoj de frivola, senpripensa socio, kiu ignoras kaj postulas de li nenion. Hamleto, subpremita de la socia etoso, ĝin rifuzas kaj intencas fuĝi, fizike per siaj vojaĝoj, mense per siaj monologoj. Don Kihoto, sufokita pro manko de socia aĉro, imagas servindan socion kaj iras ĝin serĉi per siaj famaj eliroj. Tial ke la virino estas por la viro la deviga ligilo al la socio, Hamleto malbontraktas, malestimas, malŝatas Ofe- lian; Don Kihoto inventas kaj adoras Dulcinean. La premo de

la media socio enmemigas Hamleton, determinante liajn monologojn, kiuj estas veraj pasiaj eliroj al la kampoj de lia animo, spiraloj ĝis la centro, ĉiufoje pli akutaj, kiuj finiĝas per la sinmortiga stileto; la malpleno de la media socio ĵetas Don Kihoton al liaj eliroj, veraj monologoj de agado tra la kamparoj de lia nebarita imago, spiraloj ĝis la rando, ĉiufoje pli ampleksaj kaj malplenaj, kiuj iras malaperi ĉe la sablaro de la dezerto.

Tiel okazas al ni, minacataj jen per la sklaveco de efika, prema kaj meĥanika socio, jen per la vana kaj sterila agitado de la individuo allasita en socio, kiu ne sukcesas ekformiĝi. Jen Hamleto kaj Don Kihoto gardpostenas sur la vojoj, kiujn la homo kaj la socio kutime iras, ĉe unu kaj alia flanko de la bondirekta ĉefirejo: unu, ĉe kies eniro Hamleto meditas, kondukas ĝis la tiraneco, pro troa ordemo; alia, ĉe kies eniro rovas Don Kihoto, kondukas al la anarĥio, pro manko de ordemo. La ĉefvojo iras inter tiuj du flankvojoj. Sed oni devas peni por trovi ĝin.

Notoj

¹ **Hidalgo**: hispana nobelo; tipe hispana nobelida ĝentilhomo.

² **Vitalo**: aktivo, forto de la vivapartenaj ecoj.

³ **Etoso**: spirita atmosfero.

⁴ **Mentalo**: menseco, aro de la ecoj de individuo, raso, ktp. Tuj uzas samsignife la vorton **mentaleco**.

NOTO. — Ĉi tiun artikolon mi faris laŭ ideoj kaj bildoj de la hispana verkisto vivanta en Britujo SALVADOR DE MADARIAGA, ĉefe elvolvita en liaj libroj (mi citas la eldonojn en ambaŭ verklingvoj de la aŭtoro): *Guta del lector del 'Quijote'*, Madrid, 1926, 1935, Buenos Aires, 1943; *Don Quijote: an introductory essay in psychology*, Oxford, 1935; kaj *The genius of Spain, and other essays on Spanish contemporary literature*, Oxford, 1923; *Semblanzas literarias contemporáneas*, Barcelona, 1924. — Mi devas averti, ke, kelkajn fojojn, ĉe trafaj aludoj kaj komparoj de Madariaga, mi ne rezistis la tenton kaj esperantigis ilin laŭvorte: ĉi tiu deklaro pravigu la neuzon de citiloj.

Respondo al "Israela Letero"

De RUDOLF ANDERS

Ke efektive la germana popolo neniam sciis pri la krimoj kontraŭ la judoj, tion atestis multe da voĉoj el la aliancaj landoj. La brita advokato S. C. Silkin ekz. deklaris en la proceso kontraŭ v. Manstein: Nek la germana armeo nek la germana popolo konis la intencojn de Hitler mortigi preskaŭ kvin milionojn da ĉiropaj judoj. La pli multajn de la krimoj faris la SS-trupoj, kiuj ne dependis de la armeestroj sed estis komandataj de apartaj superuloj. Kontraŭe, la armeo faris ĉion por eviti kruelaĵojn kontraŭ kristanoj kaj judoj. Ĉiuj akiritaj dokumentoj montras, ke okazis eĉ ne unu ekzemplo, ke germanaj oficiroj ne estas punintaj ekscesojn kontraŭ civiluloj.

Kial Hitler (kaj Himmler) farigis tiujn krimojn kaŝe per SS-soldatoj, edukitaj al blinda kredo kaj obco kaj plejparte ankoraŭ tre junaj? Ĉar ili sciis, ke la popolo ilin kondamnos. La 1-an de majo 1935 en parolado li forte riproĉis la burĝojn, nomante ilin "Spiesser" (= Spiessbürger, filistroj): "Sed ni forprenos iliajn infanojn, kaj tiujn ni edukos en nacisocialista senco!"

Inter la "denaske blindaj surdmutuloj" estas multaj germanoj, kiuj staris meze de la publika vivo. Ekz. generalo v. Falkenhausem rakontas pri siaj travivaĵoj: ... "Vespere ni alvenis al granda malliberulejo, kie oni tuj enfermis nin izole en kelaj ĉeloj. Mi sciigis, ke ni estas en la koncentrejo Buchenwald, pri kies ekzisto mi antaŭe neniam aŭdis."

Inter la kruclagoj menciitaj en la Letero, estas kelkaj tro absurdaj kaj ekstravagancaj por trovi kredon en Germanujo. Ili memorigas pri la kruela propagando dum la unua mondmilito. El la ĵurnalmensogoj pri forhakitaj infanomanoj kaj virinkapoj portataj sur bajonetoj poste restis nenio, sed la celo igi la amerikan popolon militema estis atingita.

Tamen la fakto ke milionoj da senkulpaj homoj estas kruele mortigitaj de la nacisocialistaj uzurpintoj, estas tiel terura, ke

ĝi premas dolorige la konsciencojn eĉ de honesta, persone senkulpa germano. Des pli kompreneblaj estas la indigno kaj doloro de la juda popolo. Sed ĉu estas pravigita tia fanatika, furia, venĝema malamego, kia ĝi sin manifestas en la Letero? Ĉu ĝi povas ion rebonigi? Kaj ĉu tia sinteno estas simptomo de supera homa etiksentento? La skribinto parolas en la nomo de la israelaj esperantistoj. Se vere ili samsentas, la nobla zamenhofa hilelismo-homaranismo ne radikis en Israelo.

La juda gento povus konvinki la mondon pri siaj superaj menseco kaj moralo, se ĝi donus ekzemplon de grandanima pardonemo al ĉiuj germanoj, kiuj aŭ estas senkulpaj, aŭ, se ili estis iel infektitaj de la hitlerismo, montras nun sinceran bedaŭron. Tio estus trajto de vera anima nobleco.

Malame povas elvoki nur novan malamon, novan malbonon. "Kiam nia malamo estas tro akra, ĝi metas nin pli malalten ol kie estas niaj malamatoj" (La Rochefoucauld). Ni diferencigu inter krimintoj kaj pekintoj. Ne nur la krimuloj, sed ankaŭ multaj centmiloj da homoj, kiuj partianiĝis nur formale, por ne perdi sian oficon kaj panon, estas severe punitaj, grandparte eĉ maljuste. Sed pekulojn oni devus konverti. Kiu volas ilin bonigi, devas ilin konsciigi pri iliaj latentaj bonaj kapabloj. Sro K.-C. faras la kontraŭon. Laŭ li la "germana nacia anima psikotraĵo" estas tia, ke oni ne povas esperi konverton kaj boniĝon.

Li kalkulas inter la grandaj homoj de sia gento ankaŭ Jesuon. Do validu ties parolo: Pardonu al mi nian kulpon, kiel mi pardonas al tiuj, kiuj kulpis kontraŭ mi! Tian altan etiksenton manifestis iam la patrino de la murdita ministro Rathenau (judo), skribante al la patrino de la juna kriminto: "Diru al via filo, ke en la nomo kaj spirito de la murdita mi pardonas al li, kiel Dio volu pardoni lin ..."

"La germanoj pereigis la klasikan mondon." La skribinto protervidas, ke estis la romanoj, kiuj detruis la multe pli altan grekan kulturmondon. Kulturoj evoluas kaj kadukiĝas. Estus interese demonstri la verajn kaŭzojn de la romimperia dekadenco, sed tia diserta krevigus la kadron de MR. Cetere la gotoj (kiujn probable celas la aŭtoro) origininte el la insulo

Gotland* kaj poste loĝinte la regionegon inter Balta kaj Nigra maroj, tute percis en la bataloj kontraŭ la okcidenta roma regno (same la nordafrikaj vandaloj); nur splitoj de la okcidentgotoj sin lokis ambaŭflanke de la Pireneoj kaj kunfandiĝis kun indiĝenoj. Gota aŭ vandala sango do ne estas en la nunaj germanoj, almenaŭ ne en tiuj de la nordo.

Pri la moroj kaj moralo de la pragermanoj ekzistas tre detala raporto de la romano Tacitus († post 117 p. Kr.): De origine, situ, moribus ac populis Germanorum. Tiu atesto rajtigas nin — kiel la ceterajn germandevenajn popolojn, inkluzive de la anglosaksoj — esti fieraj pri niaj prapatroj. Ke sro K.-C. insultas ilin "besthomoj", ne estas honoro por li.

Li senlace klopodas per artikoloj persvadi la mondon pri la supereco de la juda genio, citante multajn nomojn. Mi povus eĉ tre plilongigi tiun liston, sed atenta leganto rimarkus, ke la granda plimulto estas nomoj germanaj. Ŝajnas do ke la germanaj lernejoj kaj la influoj de la germana ĉirkaŭanta atmosfero, en kiu kreskis tiuj personoj, stimulis kaj formis la mensojn de tiuj talentuloj (ili krome ĉiam akcentis sian germanecon), dum ekz. la rusa-pola spaco, kie la hebreoj vivis multe pli amase, estis malpli fruktodona. Kaj la medio estas ja la sola faktoro, kiu modlas la esencajn trajtojn de la homoj. Tio, kion la nacistoj nomis "rasanimo", en vero ne ekzistas; la fiziologiaj diferencoj inter la diversaj "rasoj" estas nur eksteraĵoj kaŭzitaĵ de klimato kaj medio. Tion radiofonie instruis al ni elmigrinta juda scienculo, iam profesoro de la frankfurta universitato. Kiu pravas, ĉu sro K.-C., kiu vidas en ni herede antaŭdestinitajn krimemulojn, aŭ la fakscienculo?

Pamfletante pri niaj prapatroj la aŭtoro supozeble ne pensis, ke oni povos teni spegulon ankaŭ al li. Dio scias, ke farante tion mi ne celas atakon kaj ofendon. Sed eble la spegulo efikos sanige, bridante la aplomban orgojlon pri justeco kaj virtoj de la propra gento kaj ties prauloj. Oni legu do en la Biblio, la religia leĝo, la ordonon de Moseo, la "Dia homo" (Readmono 33,1): "mortigu ĉiujn ĝiajn virseksulojn per glavo. Tiel agu

*Ilipotezo; lau aliaj same aŭ pli verŝajna ili venis el alia sveda provinco. — Red. noto.

kun ĉiuj urboj, kiuj estas tre malproksime de vi kaj kiuj ne apartenas al la urboj de tiuj popoloj. Sed el tiuj urboj de tiuj popoloj, kiujn la Eternulo donas al vi kiel posedaĵon, lasu viva nenium animon (Readm. 20; 13, 15, 16)."

Kiamaniere ĉe la konkero de la "Promesita lando" tiu eternula ordono estis plenumata ni legas ekz. en Nombroj 31: "Kaj ili militis kontraŭ Midjan, kaj mortigis ĉiujn virseksulojn. Kaj prenis en malliberecon la virinojn Midjanajn kaj iliajn infanojn, kaj ilian tutan havaĵon ili rabis. Kaj iliajn urbojn kaj kastelojn ili forbruligis. — Kaj Moseo ekkoleris kontraŭ la militestroj, kiuj venis el la milito, (dirante:) Vi lasis vivi ĉiujn virinojn! Kaj nun mortigu ĉiun virseksan infanon, kaj ĉiun virinon, kiu ekkonis viron sur kuŝejo de viro, mortigu. Sed iun infanon virinseksan, kiu ne ekkonis kuŝejon de viro, lasu viva por vi. Kaj da homoj, el virinoj, kiuj ne ekkonis kuŝejon de viro la nombro de ĉiuj estis tridek-du miloj."

Pri masakro al la loĝantoj de Rabba fare de David ni legas en Samuel II, ĉap. 12, 31: "Kaj la popolon li kondukis el la urbo kaj metis ilin sub feraĵoj kaj pintoj kaj feraĵoj kaj hakiloj kaj bruligis ilin en brikfornoj. Tiel li faris al ĉiuj urboj de la amonidoj." Zamenhof tradukis: "kaj metis ĝin al segiloj kaj al feraĵoj draŝiloj kaj al feraĵoj hakiloj kaj forkondukis al brikfarejoj."

La leganto legu en la Sankta libro pri pluaj tiaj kruelagoj. Eble li statistikos, kiom ofte en pentateŭko aperas la radikoj eksterm'. Mi lasas ankaŭ al la leganto, fari konvenajn komparaĵojn kun la kruelfaroj de aliaj popoloj. Li ankaŭ meditu, kial la citita talmuda instruo ne estis praktikata, nek de la bibliaj judoj, nek en la ĵusa pasinteco.

Koncerne la Lebensraum ktp mi nur diru: Kiom da ŝtatoj en la daŭro de sia historio ne konkeris plian vivospacon aŭ strebis al ĝi? Mi vere ne ĵaluzas al la judoj ilian nun akiritan Lebensraum, sed ĉu la dufoja ekposedo de Palestino okazis pace kaj en konsento kun la antaŭaj posedantoj? Kaj sen "sango-verŝo"?

Tiuj rimarkigoj ŝajnis al mi necesaj por nin defendi kaj por klarigi kaj ĝustigi kelkajn el la maljustaj aŭ troakrigitaj diroj de la israela kontraŭulo. Tamen estus preferinde lasi senfruk-

tan polemikon kaj turni nin al la demando, kiel oni povas atingi pli bonan mondon. Eĉ la plej akra malamo ne povas forigi la realon, ke la germana popolo vivas, kaj ke la mondo, precipe la najbaroj, ĝin bezonas. La postuloj de la interhoma vivo estas pli potencaj ol antaŭjuĝoj kaj sentimentoj. Ankaŭ la veron oni daŭre ne povas subpremi.

Mi ĵus legis en germ. ĵurnalo: "107 judaj germanoj, kiuj, forlasinte Germanujon pro la persekutoj nacistaj, estis trovintaj hejmon en Shanghai, nun denove devis fuĝi. Tra New York oni nun retransportas ilin al Germanujo. 'Pro teknikaj kaŭzoj' ili devos resti en tendejo, ĝis Usono decidus pri ilia plua restadeco." La ĵurnalo proponas kaj insistas: la germana registaro zorgu, ke la senhejmuloj nepre trovu loĝejojn en Germanujo kaj la eblon praktiki siajn profesiojn. La manko de domoj kaj la ĝenerala senlaboreco ne devos malhelpi, ke tiuj bedaŭrinduloj ree havu eblcojn por vivi. Pri ili oni devas zorgi unue."

Ĉu tia voko, kiu trovos eĉon en la koro de preskaŭ ĉiuj germanoj, tiu serioza volo, kiel eble ripari la maljustaĵojn kaj repacigi la ankoraŭ vivantajn viktimojn de la nacista perfortado, ĉu tio ne estas pli konsola trajto ol la venena malamo kontraŭ homoj, kies kulpo konsistas en tio, ke inter ili estis krimuloj, kaj ke ili ne povis rezisti al ties teroro?

Jam denove multaj judoj vivas inter ni (multe pli larĝe ol en Israelo), novaj rilatoj ligas ilin al la nasklando, kaj laŭ tio, kio estas antaŭvidebla, plu neniam ripetiĝos malamikaĵoj. La eble sporade ankoraŭ latentanta antisemitismo des pli baldaŭ malapros, ju pli la judoj ĉesigos la fatalan sterilan malpacon.

Samideana letero De CARLOS de JESUS

Mi imagas, ke daŭra uzo de esperanto kaj ofta interrilato kun homoj el multaj nacioj, ke konstanta legado de artikoloj verkitaj por tutmonda publiko kaj aparteno al Esperantujo kutimigas homojn al supernacia prijuĝo de aferoj kaj intimigas ilin kun supernaciaj konceptoj. Mi supozas, ke la eco esti esperantisto ne povas elflori flanke de patriotismo, fiero pro supereco super aliaj kaj similaj sentoj. Male, mi pensas, ke tiuj lastaj ecoj de malsimpatio kontraŭ eksterlandanoj formortas dum la studado de la lastaj paĝoj de la esperanta gramatiko.

Mi do konjektis, ke esperantisto signifas ami la proksimumon kiel sin mem, respekti fremdajn popolojn kiel la sian kaj samrangigi la unuajn kun la lasta en la kampoj de rajto kaj justo. Pledo por paco kaj frateco estas atributo de samideano. Havi universalan koncepton pri absoluta egalo de popoloj kaj nacioj, de malsamaj rasoj, de doktrinoj politikaj aŭ religiaj estas morala principo, kiu pli malpli frue sin trudis al esperantistoj.

Pro tiuj kaŭzoj mi ĝojas, ke mi iam eksciis pri la internacia lingvo kaj lernis ĝin. Se mi ne estus esperantiĝinta, mi kredeble neniel povus nuntempe havi sentojn de egala amikeco al germanoj kaj judoj. Sendube mi apartenus al tiu amaso, kiu abomenas germanojn kaj kompatas judojn.

Dank' al esperanto tamen ne estas tiel.

o

Ĉar mi estas samideano, mi ne povas toleri la senbridajn frazojn, kiujn sro J. Kohen-Codack skribis komisiie de Esperanto-Ligo Israela. Mi ne povas eĉ kompreni, ke tiaj esprimoj de malamo al homoj povas ĝermi en la menso de esperantisto. Estas mirige, ke tia spirito povas rezisti kontraŭ la potenca penetro de la esperantaj ideoj. Estas nekomprenible, ke tiaj malfrataj sentoj al liaj proksimumoj la germanoj povas regi mondlingvanon, do homon kun la idealo de internacia frateco.

En "Grava rimarkigo" (nro 2/50) sro Engholm esprimis koncize sed ekzakte la konvinkon de la esperantistaro koncerne diskutaferojn: toleri la konceptojn de homoj pensantaj malsame ol ni sed tion fari en tia maniero, ke ni celas al pli bona kom-

preno, ne al venko. Sro Krohen-Cedek ne skribis "Israelan leteron" laŭ tiu ĉi principo. Li celis ne pli bonan komprenon sed venkon super la aŭtoro de "Germana letero". Li ne gardis sin eĉ de uzo de malindaj ofendvortoj, kvazaŭ la celo pravigus la rimedojn. Veraj samideanoj agas ne tiel, neniam makulas per vulgareco la esperantoidealojn.

La legantoj bonvolu memori jenajn liniojn el "Israela letero": "La spiritaĵoj de la judoj superas la germanan filistroaniman naturon", "la kaŭzo de hitleraj krimoj troviĝas en la germana *nacianima psikotrajto*;" "la germana nacio formiĝis el sovaĝaj gentelementoj"; "la germanoj devenas de praaĵ besthomoj"; ktp, ktp.

Ĉu la legantoj bone komprenis? Laŭ sro Kohen-Cedek la juda popolo estas spirite supra al la germana.

Ĉu tio ne estas pensi pri la germanoj ĝuste tion, kion Hitler pensis pri la judoj? Ĉu tio ne estas agi egale al tiuj, kiujn oni akuzas, fari la saman pekon, posedi la samajn malvirtojn?

La dua frazo diras, ke la kaŭzo de la hitleraj krimoj estis la germanoj. Do Hitler mem ne kulpis! Verŝajne li estis bona simplulo aŭ senkulpa ekzekutisto, kiun la germanoj perforte laborigis.

Restas la demando al sro Kohen-Cedek, kiu aŭ kiuj popoloj ne formiĝis el sovaĝaj gentelementoj. Li diru, kiuj popoloj estis ĉiam civilizitaj.

Kompreneble neniu mense sana homo klopodas pravigi la krimojn de Hitler, ankaŭ mi ne. Sed estas grandega diferenco inter tio kaj kulpigo al ĉiuj germanoj.

Mi tuj pruvos, ke ne estas specialaĵo nur de germanoj fali sub la ungego de hitleroj.

Se ni iom foliumas la historion, ni trovas ĉiuflanke krimojn similajn al tiuj, kiuj okazis en la hitlera Germanujo. Torquemada aŭ, pli ĝuste, la inkvizicio rostigis milojn aŭ eble milionojn da "herczuloj", imperiestro Nero ordonis bruligi Romon kune kun ĝiaj loĝantoj kaj riĉaĵoj, Herodo, reĝo de Judujo, sendis soldatojn por mortigi ĉiujn knabojn malpli ol dujarajn.

Sro Kohen-Cedek konkludis, ke la krueloj faritaj de la naci-socialismo kristalklare pravas la "germanan nacianiman psikotrajton", ĉu ne?

Kion li konkludas el la tri supraĵ faktoj el la mondhistorio? Ĉu tion, ke ĉiuj katolikaj popoloj formiĝis el sovaĝaj gentelementoj? Ke ĉiuj romaj civitanoj estis "specife krudaj"? Ke la "cinika kaj sovaĝa bruteco de la judoj estis heredita de sovaĝaj besthomoj"?

Mi estas certa, ke li ne plu faros tion, escepte se li volas riski publikan ridindon.

Prefere ni adaptu pli sanan kaj pli saĝan rezonon. Ni prefere konkludu, ke la plimulto de la germanoj ne kulpis pri la gasĉambroj nek pri la koncentrejoj. Ankaŭ la soldatoj de Herodo forgesis ja, kiam ili detranĉis la kapojn de la senkulpaj infanoj de Judujo, ke ili devas *ne idolservi, ne malĉasti kaj ne verŝi sangon*.

Ni ĉiuj estas egale faritaj el la sama ŝtofo, el la samaj karno kaj sango. Neniuj estas perfektaj. Neniuj estas pli bonaj ol aliaj. Neniuj formiĝis el pli aŭ malpli sovaĝaj gentelementoj.

La historio instruas al ni, ke ĉiuj popoloj havis, havas aŭ havos sian hitleron. Tio estas malfeliĉo, ne kulpo de la popolo.

*

Red. rimarkigo. En la komenco de la artikolo la aŭtoro parolas pri absoluta egalo de "doktrinoj politikaj aŭ religiaj". Por eviti miskomprenon kaj superfluan diskutadon, mi atentigas, ke "absoluta egalo" evidente signifas "egalan ekzistojn", kaj same evidente "doktrinoj politikaj kaj religiaj" ne povas ampleksi doktrinojn aŭ partojn de doktrinoj, kiuj predikas netoleremon kaj perforton. — Rilate al Herodo Kohen-Cedek povas kune kun la historiistoj respondi, ke la infanmurdo de Betlehem verŝajne ne okazis, ke ĝi estas historia rakontŝablono, uzita en multaj landoj kaj tempoj por glorigi unu homon kaj malglorigi alian. Sed la aŭtoro povas facile anstataŭigi tiun punkton per alia el la juda biblio. Alentu, ke tempo kaj evolu-grado estas nur flankaj aferoj. La ĉefa demando estas, ĉu ĉiuj estas kulpaj pro la agoj de iuj.

Mi konsideras la diskuton finita per la artikoloj en tiu ĉi numero.

S. E.

Ĉu pliriĉigo de nia lingvo estas malutila?

De W. v. WALDOWSKI

La lingvo venis al ni ne kiel perfekta donaco de la ĉielo, sed la esprimilo de niaj deziroj kaj ideoj evoluis tre malrapide, konforme kun la evoluo de la komuna vivado, laborado kaj produktado. La vivo estis ankoraŭ tre simpla, kaj malmultaj sonoj kaj songrupoj sufiĉis al la prahomo. Ili estis de la iniciatintoj ripetataj, komprenataj kaj fine imitataj de aliaj. Tiel estiĝis la unuaj "vortoj" aŭ "frazetoj".

Ĉiu lingvo estis des pli malriĉa je vortoj, ju pli antikva ĝi estis, stato kiu estas ankoraŭ konstatebla ĉe la restoj de la tiel nomataj primitivaj popoloj kun tre malalta kulturo. Sed eĉ la lingvoj de tre altaj kulturpopoloj kiel de la grekoj kaj romanoj, kiuj jam havis tre esprimriĉajn lingvojn, tute ne kapablas priskribi ekzemple la modernan vestaron, por ne paroli pri niaj komplikaj maŝinoj aŭ kemiaj procedoj.

La kulturo progresis intertempe, kaj ĉiu nova eltrovo kaj invento postulis novajn vortojn. Tiel pliriĉiĝis la lingvoj. La vojo de ĉiuj vivantaj lingvoj estas tiu ĉi: iniciado de unuopulo, akcepto kaj cnuziĝo aŭ forpuŝo per pli bona esprimo, fine akcepto en la vortaro. En esperanto tio okazas en la sama maniero, sed post kelkjara uzado sekvas kiel lasta ŝtupo akcepto en aldono de oficiala radikaro fare de la Lingva komitato kaj ĝia Akademio. Pri tio, ĉu la du lingvaj institucioj laboras tro rapide aŭ tro malrapide, estas tre diversaj opinioj. Kaj ĉi tiu demando meritas esti serioze pripensata.

Ekzistas du kontraŭaj opinioj, kiuj ambaŭ havas bonajn argumentojn por si. La anoj de la unua akcentas, ke esperanto estas kreita kiel dua lingvo por ĉiu, do ankaŭ por tiuj homoj, kiuj ne havas multe da tempo kaj mono por daŭraj lingvistudoj, kaj tiuj postulas, ke esperanto nepre devas esti kaj *resti facila*. Ili estas kontraŭ enkonduko de novaj radikoj. Sed la anoj de la dua postulas, ke esperanto kiel vivanta lingvo de nia tempo kapablu esprimi ĉiun idonuancon de nia komplika kulturvivo. Se por la ĉiutaga vivo sufiĉas vortotrezoro devenanta el kelkaj miloj da radikoj, ĝi tute ne sufiĉas por la science

teknika kunlaborado. Ekzistas ja tiom multe da plantoj, bestoj, mineraloj kaj kemiaĵoj, da aparatoj kaj maŝinpartoj, ke al multaj naciaj lingvoj mankas vortoj por esprimi tiujn nociojn. Eĉ la ĉefaj kulturlingvoj, kiuj posedas lian literaturon, ne kapablas pritrakti tiajn specialajn demandojn per komunkomprenebla lingvo, sed ili bezonas por tio multajn fakesprimojn, kiujn kompreni kaj uzi lernis nur la fakuloj dum siaj fakstudoj.

Esperanto volas helpi al la internacia kulturprogreso ankaŭ inter specialfakuloj. Al ili studo de multaj lingvoj rabas tro multe de ilia valora laborforto, sed per la komuna vortaro ili ne povas esprimi ĉion, kion ili deziras esprimi. Tial ankaŭ esperanto bezonas fakvortarojn kaj havas ilin jam por kelkaj sciencoj, dum en aliaj fakoj ankoraŭ estas sentebla manko, kiun la fakuloj de tiuj fakoj kiel eble plej baldaŭ devas forigi. Sed ĵen estiĝas danĝero al nia lingvo. La vortotrezoro ĉiam grandiĝas, la vortaroj ĉiam plidikiĝas kaj fortimigos multajn homojn kiuj eĉ nun kredas esperanton malfacila lingvo malgraŭ la simple klara gramatiko kaj la vortformado. Ankaŭ estas pripensinde, ke per akcepto de multaj fakvortoj en la komuna vortaro la prezo de la vortaroj konsiderinde altiĝas. Ni esperantistoj ne estas riĉuloj, kaj ĉiu el ni bezonas vortaron. Ni devas trovi vojon el tiu dilemo!

Ni sekvu konscie la ekzemplon de la popollingvoj. Ne ĉiu homo, kiu uzas ilin, regas kaj komprenas la faklingvojn. Ankaŭ en esperanto ne estas necese, ke ĉiu konas la fakesprimojn, kaj tial li ankaŭ ne bezonas vortaron, kiu enhavas ilin. Ni dispartigu nian vortotrezoron, kiel jam estas dividita la kompetento de unuopaj sinjoroj en nia Lingva Komitato. La komunlingva parto enhavu nur tiun parton de la oficialaj kaj multuzataj vortoj, kiuj havas ne fakan karakteron, parton sufiĉan por ĉiutaga bezono, korespondo kaj simpla literaturo. Tiu parto de la vortaro jam estas preta. Oni nur komisiu al la Lingva Komitato aŭ aliaj taŭgaj esperantistoj elekti la plej bezonatajn kaj multuzatajn radikojn (eble 3.000) kaj eldoni ilin en malmultekostaj vortaroj, sufiĉaj por lernantoj kaj esperantistoj sen specialaj intereso. Sed ĉiu, kiu celas fakan aŭ scienca kunlaboradon kun samfakuloj en la tuta mondo, trovu en speciala kaj fakvortaro plentaŭgan lingvon. Ĝin oni devas cel-

konscie pliriĉigi, kaj en ĝi oni akceptu ankaŭ vortojn, kiujn poetoj opinias necesaj por esprimi specialajn sentojn, se ili estus troa ŝarĝo por simplaj esperantistoj.

Sed ankaŭ ĉe la enkonduko de fakvortoj oni devas ĉiel peni, ke oni plene eluzu la eblojn de la vortfarado, eventuale per pluaĵaj sufiksoj, kiu sin altrudas en kelkaj fakoj, antaŭ ol oni enkondukas novajn radikojn. La lingvo estas ja nur helpilo por la tuthoma progreso, kaj ĝi rabu de ni ne tro multe da tempo.

Kun ĝojo mi antaŭ kelka tempo legis, ke japana meteorologia instituto aperigas sian raporton en esperanto kaj ke multaj kuracistaj fakartikoloj aperis en tiu lingvo. Sed se ni volas, ke la rondo de internaciaj scienculoj fariĝu pli granda, estus tre bone, se niaj esperantistoj, kiuj regas la sciencan en tiuj fakoj por kiuj ankoraŭ mankas esperantaj fakesprimoj, klopodus baldaŭ krei ilin. Ne plaĉas al ĉiu, kiu havas ion novan por diri al la mondo, ankaŭ fari lingvokrean laboron. Povas esti, ke li diras: "Se mi en esperanto ne povas ĉion esprimi, mi ne lernos ĝin kaj preferu uzos unu el la naciaj lingvoj."

Dividante la esperantan vorttrezoron, ni povos kontentigi ambaŭ postulojn. Esperanto devas esti kaj resti facila, malmultkoste akirebla lingvo por ĉiu homo. Sed por tiuj, kiuj ĝin bezonas por laboro por la arta aŭ scienca progreso, ĝi devas samtempe esti same riĉa kaj esprimkapbla kiel la plej altaj kulturlingvoj.

Debato

Pluaj meditoj pri spiritismo.

Leginte la artikolon de prof. Porto Carreiro Neto en MR 1950-1 mi ŝatus aldoni al mia artikoleto en MR 1949-3 la jenon:

Prof. P. C. N. nomas sufiĉe multajn detalojn pri diversaj fenomenoj "paranormalaj". Tiujn detalojn mi jam konis.

La faktoj kaj fenomenoj entute ne estas refutablaj. Sed la spiritisma doktrino estas doktrino. Tio signifas, ke ĝi estas koncepto homa, fiksita por klarigi la fenomenojn; fiksita per

kaj post observado kaj pripensado de la fenomenoj. Por tia pripensado validas unu granda leĝo: la *logiko*, kiu en pensado ĉiam parolas la lastan vorton. La doktrino, kiel pensoprodukto, ne rajtas esti kontraŭa al la logiko, ĉar tiukaze ĝi kontraŭparolus sin mem. Krome la spiritisma doktrino ne validas absolute, ĉar ne por ĉiuj "paranormalaj" fenomenoj, tiel ke ĉe eminentaj spiritistoj certigas, ke foje oni nepre *elektu* la t. n. "animisman" klarigon. Tiu *elektu* enmetas en la tutan "klarigadon" ion arbitrecan, alivorte: refoje esprimas la hipotezan karakteron de la klarigoj tiel de la animisma kiel de la spiritisma, esprimas la "ne-protecton", nedefinitivecon.

Se ni volas pensi logike, necesas unualoke ĝuste difini niajn vortojn, niajn ideojn, ĉar per nedifinitaj ideoj ni ne povas labori.

Tiel difinas mi la ideon "kredo" kiel: opinio, sur ne tute trapensita bazo, ke io estas vera. La bazo de kredo estas la "evidenteco", sed tio estas bazo danĝere neekvilibra. Mi ĉe aŭdacas diri, ke ju malpli oni pensadas, des pli baldaŭ oni nomas ion evidenta. Laŭ la supra difino la spiritismo certe estas kredo.

Mi estu konciza, sekve limigos min al starigo de jenaj demandoj, kiuj estas por homo eble la plej gravaj el la tuta vivo.

Kio estas esti? Kio estas materio? Kio estas la homo? Kio la homa spirito? Kiom ampleksas la homaj konscio kaj subkonscio?

Kiam, eble post pluraj jaroj, vi estos preta koncerne la ĝisfundan respondon al tiuj demandoj, vi rajtos juĝi definitive pri la spiritismo.

Provizore mi nur volas aldoni ankoraŭ kelkajn demandojn. Kio povas esti evidenta en la "identiga" signo de iu, "vivinta sur alia planedo"? Kiu homo povas racie diri, ĉu tia aserto estas vera? Kia garantio pri vereco povas esti en la fakto, ke mediumo ne konscias, kion li aŭ ŝi faras dum la mediuma aktiveco? Kian garantion ni havas, ke "komunikoj" devenas efektive de mortintoj, kiam ni pripensas, ekzemple, post bona studado de la ebloj de telepatio kaj hipnoto, nekonscia transporto de pensoj aŭ/kaj sentoj de unu homo vivanta al alia homo vivanta? Ĉu tiaj transportoj ne povas *principe* eliri de kiu ajn al kiu ajn, kaj ĉu *principe* ne eblas, ke iu ajn nekonscie plutrans-

donas tiajn "ricevitajn de li elscendojn" al iu alia, *principe* ĝis en senfineco? Ĉu ni ne povas kompreni, ĉu dank' al filozofio, ĉu dank' al la moderna fiziko, ke ĉiu homo, integra, estas "fortokampo", pli malpli komparebla kun elekto-magneta (atentu la novajn teoriojn de Einstein!) kaj ke dank' al la eblo ke tiaj fortokampoj povas pli malpli koincidi (neniam tute!), la homo povas pli malpli, neniam tute, esti, almenaŭ senti sin unu kun alia aŭ aliaj, kun ĉiuj eblaj konsekvencoj de tio?

(Mi ne estas ia materialisto.)

Jes, la spiritisma doktrino ŝajnas "evidenta", sed ĝi lasas tian abundon da demandoj neresponditaj, ke ĝia evidenteco vere estas nur tre provizora, nur tre momenta. Krome ĝi estas kontraŭa al la logiko.

Ni kuraĝu pensi aŭ ekpensi logike.

Ankoraŭ kelkaj, kvankam ne tiom gravaj rimarkigoj:

Kial prof. P. C. N. ne aldonas al la parafino-eksperimentaj raportoj, ke tamen ekzistas tia interrilato inter la sin montranta "spirito" kaj la mediumo, ke tiu lasta (kun-) sentas la doloron? Ke mediumo povas labori mirige rapide estas tre konate. La mediumo estas en sia aktiveco subkonscia, liberigis do de multaj bremsoj de la konscio, kaj tiel la rapideco denove estas ne miriga. La reenkariga teorio estas jam longe superita de la okcidenta filozofio.

Lasta konsilo: kiu volas profundigi en temo kia ĉi tiu, tiu studu, studadu kaj nepre ne forgesu iun ajn detalon; ĉio logike estas ligita al ĉio, neniu ĉenero povas manki, precipe ne la detaloj, kiujn donas la "ordinara" psikologio, precipe la t. n. profundpsikologio. Kaj ĉio estu funde trapensata filozofie.

Esperante ke per ĉi tiu artikoleto mi donis al vi iom da interesa pensolaboro mi nun finas kun la peto, ke event. plua interrilatado pri ĉi tiu temo okazu koresponde kun mi. Mia adreso estas trovebla en MR 1949-3.

C. Joon.

Aliaj pensoj pri etiko.

Al la esejo de L. C. Deij (1950 nro 1) mi sentas min devigata fari kelkajn rimarkigojn. La aŭtoro tie skribas, ke la Dek

Ordonoj en la malnova testamento de la biblio entenas en si kompletan etikan instruon, validan ĉiam, ĉie kaj por ĉiuj homoj, kaj ke 32 jarcentoj da kulturo apenaŭ povis aldoni al ili ion esencan. Tia prezentado de la Dek Ordonoj de Mosko montras grandegan trotaksadon de ilia etika valoro. Certe ili signifas nepre necesan gvidilon por la praktika socia kunvivado de la homoj, ne nur por la tiama tempo de ilia deklaro, sed por ĉiam, sed ilia etika valoro estas malgranda. Ordonoj, precipe malpermesoj, venantaj de ekstere, eĉ en la nomo de Dio, povas havi etikon kiel celon, sed en si mem ili entenas nenian etikan valoron, same kiel la tuta, nesupervidebla amaso da juraj leĝoj. Kio kunligas ilin kun etiko, estas nur tio, ke ili krom la ordigo de la homa socio, por ke ties anoj ne disŝiru sin reciproke, provas vekti en la animoj de la homoj etikan senton, tiel ke tiuj de ekstere venantaj ordonoj fariĝu tiaj de la konscienco. Sian plej altan celon ili atingas, se la karaktero de ordono, eĉ konscienca, plene estingiĝas kaj donas lokon al neŝancelebla, memvola etika sinteno el la profundo de la animo. Al tiu supro, atingebla nur al tre malmultaj individuoj, neniam kapablas gvidi nur la Dek Ordonoj. Estas facile imagi, ke homoj ilin strikte observantaj restas tamen tre malsocimaj, rigardantaj la obeon al la ordonoj nur kvazaŭ negocan kontrakt-on kun la dia potenco, kaj la historio de ĉiuj tempoj ĝis hodiaŭ donas pri tio sufiĉajn ekzemplojn laŭ personoj kaj tutaj popoloj. Tiam mensecon trafe skurĝis la germana humoristo Busch, kiu honestan burĝon paroligas jene:

La bono, tiu tezo klaras,

Estas malbon', kiun ni ne faras.

Tio neniel rilatas al etiko.

Tia sinteno estas observebla en ĉiuj religioj. Ekzistis historiaj tempoj, en kiuj la etiko atingis tian gradon de malforteco, ke ĝi dronis en nura ekstera obeo al la "ordonoj" nomataj diaj, sed ofte nur pastraj sub ŝajnigo de diaj. Precipe dum tiaj epokoj stariĝis religie inspiritaj homoj por reaktivigi la perdiĝantan etikosenton. En tia situo troviĝis ankaŭ, por doni ekzemplon, la loĝantaro de Palestino antaŭ la ekagado de Jesuo, kiam la oficiala religia vivo kontentiĝis pri nura senta obeado al eksteraĵ formuloj.

Tiu nova profeto, fondinto de nova, en la komenco pure etika religio, deklaris la etikon centro de ĉia homa agado. Tiun etikon li difinis tiel, ke la homo devas plenkore ami Dion, la kreinton de la mondo, kiel sian patron, kaj same ami la kunhomojn kiel siajn fratojn kaj samrajtajn infanojn de patro Dio. Oni komprenas, ke tiu en formo de ŝajna ordono donita preskribo povas esti nur etika postulo. *Amon oni ne povas ordoni.* Kompreneble, tiu etika bazo bezonas por la ĝusta konduto en la sennombraj unuopaj kazoj de la homa vivo multegajn, ĉiam ripetotajn komentojn. Tiujn donis en multaj, al ni venintaj eldiroj Jesuo mem, poste aliaj, kredantaj sin kompetentaj por tia tasko. En la preskaŭ senlima kadro de tia baza etiko havas ja lokon ankaŭ la Dek Ordonoj kiel direktiloj, sed nur kiel ties plej elementa parto. Oni povas kontraŭdiri al tiu ĉi envicigo, ke la homaro bezonas sufiĉe da klopodado por sekvi nur la Moseajn preskribojn. Tio ne malhelpas, ke religie kaj etike la deklaro de Jesuo staras sur multe pli alta ŝtupo, eĉ la plej alta imagebla. Tiu eldiro ne intencas fari valordistingon inter ambaŭ religiuloj. Mosko donis en sia tempo al sia popolo certe inter la tiamaĵ cirkonstancoj la plej bonan direktilon por ĝia religia kaj etika konduto. Pli multan aŭ altan li ne volis doni. Sed komparante nur la etikan esencon de ambaŭ religiaj deklaroj, tiu de Jesuo estas supera, la plej supera al ĉiuj iam donitaj. Lia etiko staras tiel alte, ke ĝi estas por ĉiam socia tasko apenaŭ iam tute plenumbla. Lia merito ne malpliĝas per la diro, ke tia religia koncepto ne estas origina, ke altruista (malegoista) konsidero kaj amo al la kunhomoj estas apartenaĵo ankaŭ de aliaj pli antikvaj religioj kaj filozofoj. Li estas tamen la unua, kiu klare kaj decide almetis tiun amon kiel ununuran fundamentan principon, entenantan en si la tutan amplekson de la socia etiko.

Ne solvita restas ankoraŭ tiu parto de la etiko, kiu rilatas la konduton al la ceteraj vivaĵoj, la bestoj, kaj al la naturo entute. La biblio, kiu difinas la homan genton estro de la tuta tero, estas nesufiĉa dokumento, por fondi sur ĝi kontentigan etikon.

E. Kuder-Matéffy.

Voĉo el Japanujo

Post la milito mi serĉas korespondantojn en Usono, kaj iam mi petis kanadan samideanon, ke li bonvolu prezenti al mi usonajn samideanojn. Mi skribis korespondadon al kelkaj usonaj samideanoj, sed ĝis nun mi ne ricevis respondon.

Mi firme kredis la japanan registaron dum la milito, sed nun mi tre hontas, ke mi ne estis pli saĝa. Mi tre deziras korespondi kun usonaj samideanoj, kaj mi volas en la nomo de japanaj esperantistoj pardonpeti al ĉiu korespondanto usona pro nia kulpo, kaj samtempe mi volas sciigi al miaj samlandanoj, ke ankaŭ usonaj esperantistoj klopodas por mondpaĉo per esperanto.

Tamen mi nun iom dubas, ĉu usonaj esperantistoj ĝuste komprenas la japanajn. Kaj mia dubo pliprofundiĝis, kiam mi legis la artikolon de sro Engholm en nro 1/50 de MR. Ankaŭ en Japanujo la esperantomovado denove fariĝis vigla post la milito. Sed plej vigle nun laboras komunistaj esperantistoj, kaj tial ŝajnas al necesperantistoj, ke esperanto apartenas nur al komunistoj. Ankaŭ al usonaj esperantistoj eble ŝajnas, ke japanaj esperantistoj ĉiuj estas komunistoj, ĉu?

Antaŭ la milito mi korespondis kun ĉiulandaj samideanoj, sed nun mi ne korespondas kun sovetaĵ esperantistoj.

Mi ne povas kompreni, kial stalinismaj komunistoj nomas ĉiujn "malamikojn", kiuj ne apartenas al ilia ideologio. Kaj mi tre bedaŭras, se usonaj samideanoj rigardas nin ĉiujn japanajn esperantistojn kiel "komunistojn" kaj se ili pro tio estas singardemaj aŭ suspektemaj kontraŭ ni. Kaj mi tre bedaŭras, se pro tio usonaj esperantistoj ne ŝatas korespondi kun japanaj. Mi tamen esperas, ke tiu supozo estas erara.

Efektive, komunistaj esperantistoj nuntempe estas multaj en Japanujo, kaj ili laboras per esperanto kaj por la esperantomovado pli vigle kaj energie ol la nekomunistaj.

Mi tial tre esperas, ke usonaj esperantistoj instigu kaj kuraĝigu japanajn nekomunistajn esperantistojn, ĉar nuntempe japanoj ĝenerale havas grandan intereson pri Usono kaj usonanoj. Se usonaj samideanoj kuraĝigos la japanajn nekomunistajn samideanojn, se pro tio la japana esperantomovado fariĝos

pli vigla kaj se japanaj samidcanoj povos sentime propagandi esperanton, tiukaze estos paco kaj socia bonordo multe pli frue en Japanujo, kaj tio helpas al la mondpaco, mi kredas. Ĉu mia opinio estas tro simpla kaj naiva? Ĝi povas esti naiva, sed ĝi estas vera! Se oni lasas Japanujon en la nuna stato, oni en baldaŭa estonto trovos nenium nekomunistan esperantiston en nia lando, kaj en la mondo sendube denove okazos malfeliĉa milito. Ĉu tiam, kiam la japanaj esperantistoj ĉiuj estos komunistoj, Japanujo fariĝos vere demokrata lando? Mi neniel povas kredi, ke la komunismo estas la ŝlosilo de la mondpaco.

Mi scias nur tion, ke la komunistoj tre malamas la militon. Kaj nur en tiu rilato la komunismo povus plaĉi al mi, sed mi abomenas la perforton, pri kiu Lenin insistis. La perforto ja estas milito, ĉu ne?

Japanaj komunistoj insistas, ke ĝuste ili kaj nur ili estas demokrataj kaj ĉiuj aliaj partianoj estas ne demokrataj. Sed mi ne povas konstati demokratecon inter la komunistoj. Laŭ mi ili estas tro memkontentaj kaj tro arogantaj, kaj pri la memkontento kaj aroganteco ili mem ne konscias. Tiu sinteno ĉe ili estas al mi antipatia — ĉe naŭza. "Esperanto ne estas monopolaĵo de la komunistoj."

Usonaj esperantistoj sciu, ke ne ĉiuj japanaj esperantistoj estas komunistoj! Kuraĝigu la nekomunistajn japanajn esperantistojn! Ilia situacio estas malbona, ĉar oni ne komprenas ĝuste, kio estas esperanto.

Masao Kakuo.

Lingvaj sugestoj

Profesoro.

En iuj lingvoj la vorto profesoro havas la signifon nur de universitata instruisto. En aliaj ĝi havas la ĝeneralan signifon de instruisto, kaj ĉe instruanto de esperanto estas nomata profesoro. Tiun diversecon de signifoj la diversnaciaj esper-

antistoj donis ankaŭ al la esperanta vorto. Pl. V. difinas: Instruisto en supera lernejo: licea, universitata profesoro. En multaj landoj tiu limigo ne estas respektata, verŝajne oni ĉe ne atentis pri ĝi.

Ŝajnas al mi dezirinde interkonsenti pri preciza signifo de tiu vorto kaj pri unueca uzo. Se mi en gazeto aŭ revuo ĉe la nomo de artikolaŭtoro aŭ intervjuito trovas la titolon profesoro, povas temi pri universitata profesoro, sed povas temi ankaŭ pri popollerneja instruisto aŭ ĉe pli malpli okaza instruanto kun ne multe da scio. Tia necerteco foje estas ĝena. Se mi scias, ke temas pri universitata profesoro, mi scias ankaŭ tion, ke estas homo kun disciplinita pensado, kiu zorge elektas kaj kontrolas la donatajn faktojn kaj kies eldiroj estas efektivaj konkludoj kaj konceptoj sed ne nuraj opinioj. Tio ne signifas ke la artikolo nepre estas prava kaj nerefutebla, sed ĝi estas verko de disciplinita penslaboro kaj tiurilate mi povas plene fidi ĝin, precipe ĉar tiaj profesoroj ordinare verkas pri temoj, kiuj apartenas al ilia fako. Se temas pri alispeca profesoro mi ne havas tiun garantion. Efektive alia artikolo povas esti same bona, kaj la vera valoro de ĉio skribita kaj dirata dependas ne de la profesoreco sed de la spirita stato de la aŭtoro. Tamen, same kiel en aliaj fakaj, disciplinitaj laboroj, ni povas fidi kaj devas respekti tiun de profesia pensa laboro.

Por uzi la vorton kun preciza senco ni povas diri aŭ: universitata profesoro, licea profesoro, mezlerneja profesoro ktp ĝis esperantokursa profesoro; aŭ: universitata profesoro, licea profesoro; aŭ: profesoro. En la lasta kazo la vorto profesoro do estas uzata nur por universitata profesoro, kaj aliaj instruistoj havas aliajn titolojn. Tiu lasta solvo ŝajnas al mi preferinda.

Senkonscia, nekonscia.

En diversaj tekstoj mi vidis la vortojn senkonscia kaj nekonscie uzataj en la senco de nerimarkata, nerimarkite (de oni mem). Tiu uzado estas kaj zamenhafa kaj laŭ Pl. V. "Por peko senkonscia puno nenia"; "senkonscia imitado de la ekzistantaj lingvoj". Ni tamen havus bonan nuancodistingon, se

ni uzus la vortojn senkonscia kaj senkonscie nur kiam temus pri vera perdo de la konscio, kaj se ni en la senco "nerimarkate de oni mem" uzus nekonscia, nekonscie.

Vortoj ordinare neuzindaj.

En Pl. V. troviĝas la vorto ekstemporala, uzita de Zamenhof. Se oni uzas tiun vorton en la gepatra aŭ alia bone konata lingvo, oni eventuale komencas uzi ĝin ankaŭ en esperanto, kaj oni povas facile uzi ĝin kiel verbon, adverbbon kaj adjektivon. Por homoj, kiuj ne estas latinuloj, tia vorto tamen restas kvazaŭ anstataŭaĵo de vera vorto, signo kiu ion signifas sed en si mem estas senviva. Kiom pli viva estas la vorto senprepara kaj ankaŭ improviza. Ankaŭ la radikoj prepar' kaj improviz' estas ja kunmetaĵoj nekompreneblaj al tre multaj, sed pro klara rilato al certa ago kaj pro ofta uzado en difinita senco ili estas multe pli impresfortaj ol ekstemporala. — Alia tia vorto estas korelativa = reciprokifata, aŭtonoma = memstara, kaj diversaj aliaj.

Ni ne provu forigi tiajn vortojn el la lingvo. En certaj okazoj ili povas esti utilaj. Sed por la ordinara lingvouzo la pli sencoklaraj vortoj pli bone servas.

S. E.

Literaturo

Ĉu socialisma libero aŭ kapitalisma servuteco?
Eldonita de Usona socialista laborista partio,
distribuata de SAT.
Prezo: 0,17 dol., 60 fr. fr.

Laŭ subtitolo tiu ĉi 32paĝa broŝuro estas "Deklaro de la Usona Socialista Partio". Ĝi prezentas resumon de la ĉefaj punktoj en la doktrino de Marx. Legante la broŝuron oni ricevas la impreson, ke ĝi aŭ estas verkita en la infanaĝo de la laborista movado aŭ estas identa kun la rusa marksismo. Ĝi estas

propaganda skribaĵo, plena de kredo, entuziasmo, fervoro. Kapitalisto kaj kapitalismo estas la plej fortaj kaj pruvoriĉaj vortoj, egalaj al diablo kaj infero en ortodoksa kristanismo. Sed jen venas la vortoj "sub ia Socialista Industri-Uniismo", kiuj sugestas, ke ne temas pri ia sovela aranĝo. Al la sovetismo similas la avertoj kontraŭ "la vizioplena reformistaro", "la misgvidistaro"; "malfidu tiujn, kiuj pozas kiel socialistoj, sed kiuj efektive ligas sin al kapitalistaj intereso por ĉiamigi la kapitalisman sistemon." "Falsece ili (la britaj socialistoj — noto de rec.) nomas sin socialistoj", kaj ilian potencakiron 'Venko por Laboristaro kaj Socialismo', sed efektive ili estas malamikoj al la laboristaro kaj kontraŭsocialistoj. Ilia ĉefa zorgo estas la konservado de la sistemo kapitalisma kune kun la protektado al la Brita komerca potenco sur la kampo internacia." Sed fine venas ankaŭ tiu ĉi averto: "Malfidu ankaŭ la pseŭdo-marksanojn (kiujn ĉiu konas sub la nomo Stalinistoj), kiuj babilas pri sia "Socialisma ŝtato" — terminoj, kies unua kontraŭdiras rekte la duan ("la ekzisto de ŝtato estas malkunigbla disde sklaveco" — Marks)".

Laŭ ĉio temas pri nova marksisma partio, diferenca de la rusa rilate al ŝtato kaj regopotenco, ĝia rivalo en la efektiviĝo de la mondrevolucio (ĝi turnas sin al "gelaboristoj en la tuta mondo". "Kapitalismo signifas militon" estas ripetata esprimo en la broŝuro, sed laŭ la prezento de aliaj socialismaj doktrinoj ŝajnas, ke ankaŭ diverseco de socialismaj doktrinoj povas signifi militon.

Kiel oni volas efektiviĝi sian doktrinon?

"Kontraŭ tia sistemo (la kapitalisma — noto de rec.) la Socialista Laborista Partio levas la standardon de ribelo kaj postulas la senkondiĉan kapitulacion de la kapitalista klaso. En tiu ĉi superega krizo neniam reform-klopodoj taŭgas ... la kapitalismo devas cedi al nova sociordo — sociordo en kiu la regado sin fundamentos sur la industrio, baziĝante sur utilaj okupoj anstataŭ sur teritoria (politika) reprezentado. Ĉi tiu nova sistemo povas esti laŭ regad-formo nur la Socialista Industria Unuiĝo ... Ĉe la prirabita laboristaro restas la devo laŭ maniero paca kaj civilizita efektiviĝi la revolucionan ŝanĝon, tiucele utiligante la baloton kaj ĉion, kio dependas de ĝi."

Tio sonas bone, sed tute klaran komprenon pri la programo ĝi apenaŭ donas. Ankaŭ Mussolini provis starigi regadon bazitan "sur utilaj okupoj".

Bona celado estas laŭdinda. La celado de Socialista Laborista Partio estas bona. Laŭ mia kompreno la doktrina rezonmaniero tamen havas gravajn mankojn. La socihistoria koncepto estas same mekanika kiel la rusa. Etika bazo por la homa kunvivado ne ekzistas. Ĉio dependas de la sistemo. Sangŭ ĝin, kaj ni estos en la ĉiela regno. Tiel oni diris en multaj tempoj kaj landoj. Oni ŝanĝis la sistemon sed forgesis ŝanĝi la homojn, kaj la nova sistemo esence ne multe diferencis de la antaŭa. Kaj ne nur la homoj kaj ilia konduto estas grava parto de progreso. Ĉiu taŭga laboristo scias, ke teorio havas valoron nur se ĝi estas plene konforma al la efektiva laboro, la materialoj, la laborrimedoj, t. e. al la realo. En sociaj doktrinoj, ankaŭ en ne socialismaj, ofte mankas tiu kvalito.

Estas granda plezuro legi la vivan, bonritman kaj entute bonan kaj naturan stilon en la broŝuro. Sur p. 25, meze: "La sole realigebla plano". 'Sole' signifas 'nur' aŭ 'solstare'. Devus esti 'sola'. — P. 26, l. 15: "inter la laboristaro". 'Inter' postulas minimume du flankojn. Devus esti 'en' aŭ 'inter la laboristoj'.

S. K.

Vilho Setälä: Burĝonoj. Infanoj en poezio kaj fotografio.
Eld. Vilho Setälä.
Prezo: 30 steloj, 7:50 guldenoj, egalvalore en aliaj valutoj.

La fotoj en tiu ĉi libro estas faritaj de Vilho Setälä kaj Arja Kaartotie-Setälä. La poemoj estas el Kanteletar, la finna lirika popolpoemaro kaj de 14 finnaj poetoj, inter ili la plej gravaj. La poemojn tradukis J. E. Leppäkoski kaj Vilho Setälä. La libro estas grandformata, 21×29 cm, 80paĝa, roto-grafe presita sur luksa papero, bindita en bonega kartonkovrilo kun tola dorso.

Vilho Setälä diras en la antaŭparolo: "Infano antaŭ kamero — rava renkonto, riĉa kiel la sorto mem. En la etulo burĝonas

la semo al ĉio homa. En ĝia okulo vi trovas la trankvilan mediton pri la vivo kaj la petolan iudon en la sunbrilo, tie estas la serioza volo al kreado, la venkanta vetkuro kaj lukto. Tie la modesta senafekta simpla kaj la teatra sinakcento, troviĝas la serena ĝojo kaj la fekunda ploro."

Al tiaj vortoj oni devus nenion aldoni. La bildoj en la libro ilustras ilin. Mi neniam estas kompetenta prijuĝi fotografian arton, povas tial diri nur tion, ke la bildoj tre plaĉas al mi kaj certe plaĉos al ĉiuj.

Kaj tamen mi devas ion aldoni, unue la esence superfluan rimarkigon, ke tiuj vortoj enhavas neniam da gepatra kaj plenkreskula sentimentalulo kaj romantiko rilate al infanoj sed esprimas vivrigardon kaj vivmediton. Kaj due, tiu vivrigardo kaj tiu vivmedito estas personaj, sed samtempe ili estas, en la poemoj, vasta kaj profunda esprimo de la finna spirito, de la finna vivrigardo kaj vivmedito. Kion la finna spirito donis estas origina kaj grava, venas el la ne malhaveblaj fontoj de la vivo. Ne senkaŭze oni faris komparojn inter la finna spirito kaj la greka. Tiel Burĝonoj meritas lokon ne nur inter belaj bildlibroj sed ankaŭ apud Sep fratoj.

Eble vi trovos, ke la poemoj strange kontrastas kontraŭ la bildoj. Super bela somera bildo troviĝas la poemo "Polvo" de Koskenniemi:

Ni jam infanaj vin unue vidis,
dum suno brilis tra fenestr' ardante,

— — —
Vi tiel sekvas nin en nia sorto,
tra l' tuta viv' vi tuŝas niajn agojn,
vi, polvo, ĉirkaŭanta niajn tagojn,
ĝis mem ni estos polvo post la morto.

Aŭ "Tombo de infaneto" de la sama poeto:

Venis el nokto en nokton mi, lumon apenaŭ mi vidis,
ĉe la matenon mi ne vidis el tago de l' viv.
Min en la mondon neniu esperis, mi mem ne esperis,
estis okaza deven', naskis min nura hazard'.

Stranga tumulto sur mia tombeto scence sonoras,
paŝoj rapidas kaj jen sonas stariĝo, jen fal',
Supremigranto, en tago de vivo, ho diru al mi jam:
kien rapidas la mond', kien paŝad' sur la tomb'?

Sed la kontrasto estas nur ŝajna. La vivo estas tute, kaj ridetanta, freŝa burĝono ne estas eterne aparta, daŭra ekzistaĵo sed apartenas al la universala tute kun ĝiaj ŝanĝoj. Tial tiaj vortoj en tia loko ne estas nenaturaj aŭ afektitaj. Ili devenas al profunda vivkoncepto. La citaĵoj ne fortimigu tiujn, kiuj ŝatas pli idiliajn aferojn. Troviĝas ankaŭ sunaj kaj delikate belaj poemoj. Sed komuna kvalito de ili ĉiuj estas, ke ili estas veraj poemoj, kies simpla sed profunda vivovaloro dum la legado tuj estas memkompreneblaj al ni. La esperanta verso estas tre bona. Pri kelkaj el la poemoj mi scias, ke la redono de la originaloj estas tre altkvalita. La profunda impresado de la aliaj atestas pri la sama kvalito.

Tiuj burĝonoj, en bona interligo kun la poetoj, parolas al ni ankaŭ kiel senditoj: "Tiel delikata, bela kaj riĉa, tiel enigma kaj animvibrige mistera estas la vivo. Homo, kion vi faras el via propra vivo, kiel vi zorgas por la morgaŭa tago, en kiu la burĝonoj malfermiĝos?"

S. E.

*

ABC-libro.

Eld. The Esperantanto Publishing Co, Ltd.

Aĉetebla pogrande ĉe la eldonejo, detale ĉe landaj libroservoj aŭ ĉe UEA.

Prezo: 1 angla ŝ. aŭ 4 rpk.

Tiu ĉi abc-libro, tio estas libro kun bildoj kaj versaĵoj por ĉiu litero, kredeble estas tute nova apcraĵo en esperanto. Tekstoj kaj bildoj kaj papero havas diversajn kolorojn sur diversaj paĝoj. La esperantoinfanoj kun ĝojo akceptos tiun libron. Mi kredas, ke povus havi certan efikon donaci ĝin ankaŭ al infanoj neesperantistaj. Se la libreto havos sukceson, la eldonejo klopodos eldoni ankaŭ aliajn infanlibrojn. Zorgu por ĝia sukceso!

S. E.

Jarlibro de UEA 1950, unua parto.

La jarlibro de UEA estas neaĉetebla kaj ricevebla nur de individuaj membroj de UEA. La kovrilo de la nunjara eldono havas alian koloron ol antaŭaj. Ĝi plaĉas. La papero estas pli bona. Aliaj novaĵoj en la libro estas listo de verkoj aperintaj en la lastaj du jaroj, listo de esperantaj mallongigoj konstante uzataj, finaj ciferoj kaj detaloj de la petskriba kampanjo.

Pro sia delegitlisto, librolisto, informoj pri eldonejoj, gazetoj, akademio, universalaj kongresoj, fakaj asocioj ktp ĝi estas unu el la plej necesaj konsultlibroj.

S. E.

*

Urbo Belo Horizonte.

Havebla por 5 rpk de Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República, 54-1, Rio de Janeiro.

Belo Horizonte estas ĉefurbo en la brazila ŝtato Minas Gerais. La bela bildlibro estas pretigita de la esperantosocieto de Minas Gerais kaj eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. La granda helpo al la esperanta movado de tiu instituto ne restu sen aprobo kaj instigo al plua eldonado. Aprobo kaj instigo estas mendo de iliaj eldonaĵoj.

*

Tähtitaivas (La stelĉielo), periodaĵo de finna amatorastro-noma societo, en nro 10 1949 havas en esperanto enhavotabelon kaj resumon de pli gravaj artikoloj. Redaktoro estas prof. Y. Väisälä, Universitato, Turko, Finnlando.

Grava memorando

La germana esperantoasocio eldonis "Memorando pri fundamenta simpligo en internacia trafiko per uzado de dulingvaj dokumentoj", verkita de supera registara konsilisto dro Artur

Bormann. Ĝi estas bonege kaj celkonvene verkita. Unue la aŭtoro prezentas la problemon, kiun kreas multlingvaj dokumentoj en la internacia trafiko. Drasta ekzemplo estas ekzemple la internacia aŭtolicenco, kiu havas tekston en 23 lingvoj, kaj same la internacia aŭtista licenco. Poste li montras solvon de la problemo per helpo de esperanto kaj indikas la aplikon. Fine li donas kompletajn specimenojn en nacia lingvo kaj esperanto de pasporto, frajtletero, dogandeklaroj por trajna kaj poŝta trafiko, pakajkartoj, aŭtolicenco, aŭtista licenco, triptiko, internacia respondkupono.

La celo de la memorando estas atentigi la samideanojn kaj la registarojn pri la progreso, kiun esperanto ebligas en tiu kampo. Ĝi estas fundamento de plua agado, almenaŭ bazo por pridiskutado kaj elirpunkto por komuna agado. La germanaj esperantistoj laboros por tiu celo en sia lando kaj esperas pri paralela laboro en aliaj landoj. Tiuj, kiuj havas intereson por la projekto kaj povas helpi en tiu laboro, serĉu kontakton kun dro A. Bormann, Missundestrasse 5, (20) BIELEFELD, Germanujo.

Oni petas, ke la alilandaj asocioj, se eble, organizu preparu kaj realigu tiun planon. Oni esperas pri organizita kunlaboro en ĉiuj landoj por la celo skizita en la broŝuro. Prijuĝoj kaj eventualaj korektoj estas bonvenaj.

Tiu plano estas realigebla jam nun, kvankam esperanto ne estas oficiale rekonita kiel internacia lingvo. Por praktika uzado sufiĉas kelkaj malgrandaj vortlistoj por la koncernaj oficistoj. La propono estas tiel loga, ke oni preskaŭ povas esperi, ke la registaroj konsideros ĝin.

La germana esperantoasocio kaj dro Bormann faris treege gravan servon per la pretigo de tiu memorando. Estas praktika plano tre facile praktike aplikebla. Ĉiuj, kiuj povas iel kunlabori en tiu afero, nepre kaj tuj turnu sin al dro Bormann, de kiu ili ricevos deziratajn informojn.

S. E.

SUGESTOJ KAJ KONSIDEROJ PRI MR.

Leginte miajn antaŭajn informojn pri MR sufiĉe multaj skribis al mi kaj sugestis rimedojn por plibonigi la ekonomian staton de la revuo kaj ankaŭ ĝian altirpovon. Jen miaj konsideroj pri la ĉefaj el tiuj sugestoj.

Pluraj proponis, ke MR havu anoncojn por tiel ricevi enspezojn. — Mi fondis MR, por ke ĝi donu valoran legaĵon sen anoncoj kaj informoj. Tiaj troviĝas kontentige en aliaj gazetoj, kiujn aktivaj esperantistoj abonas. La legantoj ne bezonas anoncojn en MR kaj la anoncantoj certe ankaŭ ne. Tiel reklamo en MR estus sensenca okupiĝo kaj anonchavigo nur almozpetaĵo. Kaj almozojn mi nek petas nek akceptas en iu ajn formo. Cetero mi supozas, ke granda parto el la anoncoj en esperantaj gazetoj estas interŝanĝaj, kaj tiuokaze la gajno tamen estus nula aŭ preskaŭ nula. MR volas vekti pensojn, esti loko por komuna kaj reciproka spirita kulturado. Se ne troviĝas kontentige da abonantoj kun tiuj interesoj (sufiĉe modesta abonombro estas bezonata por eldoni la revuon sen monperdo), kaj se la legantoj same kontente legas anoncojn kaj informojn kiel ili nun legas artikolojn — tiuokaze ne estus multe da senco en plujaj klopodoj por daŭrigo.

Iuj demandas, kial mi ne enkasigas abonojn, t. e. memorigas al antaŭaj abonantoj, ke ili sendu monon por nova abono, kiam malnova finiĝis. — MR ne estas entrepreno por komerco aŭ vivteno. Ĝia senco kaj valoro, se sencan kaj valoron ĝi havas, estas kaj devas esti alia. Se iuj legantoj havas tiom malmulte da intereso por la enhavo de MR, ke ili forgesas aboni ĝin, mi sincere diras al ili, ke ili ne abonu ĝin. Estas ja sensence havigi al si ion, kion oni ne deziras aŭ bezonas, kaj neniu havas iun ajn devon rilate al MR. Mi supozis, ke tiom de homoj povus senti bezonon de revuo, kia estas MR, ke la eldonado havus sencan kaj estus ekonomie ebla. Se ne estas tiel, mi kaj vi, fidclaj amikoj de MR, devas rekoni tiun fakton.

Kelkaj opiniis, ke la revuo devas aperi pli ofte, monate, duonmonate, unu proponis eĉ semajne. Oni forgesas de unu numero ĝis alia la diskuttemojn kaj aliajn memorindajn aferojn kaj tiel perdas intereson por la enhavo. — El iuj vidpunktoj

certe pli ofta apero estus bona. Sed mi mem pagas nun minimume unu kvaronon, verŝajne pli, de la elspezoj por MR. La supraj proponoj signifas, ke la defcito fariĝus duobla, kvarobla, okobla. Mi estas konvinkita, ke pli ofta eldonado ne altigus la abonombrojn, almenaŭ ne konsiderinde. Krome jam la dumonata eldono postulas tiom da tempo, precipe korespondo, ke por mi estus tute necble eldoni ĝin eĉ monate.

Multaj proponis, ke MR havu pli da literatura, unu eĉ, ke ĝi estu unuavice literatura revuo. Literaturo, kvankam kun limigita spaco, jam de la komenco estis en la programo de MR. Sed bedaŭrinde ofte mankis tiaj kontribuoj, kaj mem mi ne trovis tempon por verki ion. Volonte mi aperigos literaturajn kontribuojn, inkluzive recenzojn. Sed estu literaturo, kiu meritas tiun nomon kaj prefere originalan. Aperigi tradukojn de sensignifaj rakontoj estus malsaĝa uzo de multekosta spaco. La proponon ke MR fariĝu unuavice literatura mi respondas per ne. MR estas dediĉita al la vivo kiel tuto, kaj tia ĝi restu.

En espero pri progreso mi presigis de la lastaj numeroj 100 ekz. pli ol ordinare Sed tiel restas nun ĉ. 200 ekz. nevenditaj. Helpu trovi abonantojn aŭ aĉetantojn por ili!

S. E.

KOREKTOJ:

En nro 2/50 afable korektu:

- P. 31, lin. 7 de mals., anst. dispecigis — disspecigis.
„ 32, „ 8 „ „ montriĝas — montiĝas.
„ 33, „ 13 „ „ kiel — kial.